

La milita plago

Claude Gacond, 199-a radioprelego, 1967.08.02 & 1967.08.05

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antikva fablo bone priskribas la nunan spirito-staton de la homaro koncerne al la armada plago. Temas pri murde trafita aglo, kiu veas, ĉar li rimarkas, ke lin vundis ne fremda sago, sed propra plumo.

A.- La legantoj de *Ezopa Saĝo*, verko de Kalman Kalocsay, certe meditis tiun sesversan poemeton titolita *La aglo kaj la sago*. Aŭdu ĝin :

Cl.- *La aglon murde trafis piko
de sag' plumita, kaj li veas :
« Ho jen, mi ne de malamiko,
sed de la propra plum' pereas. »
Popolon falĉas armtekniko,
sed kies manoj do ĝin kreas?*

A.-Vei ne sufiĉas. Veado ne protektas kontraŭ la milita plago, kiu tutcerte kronas armadan konkurson.

Cl.- Antaŭ ĉio oni devas eviti ĉian pasivemon antaŭ la milita plago, kaj la superstiĉo, kiu kredigas, ke ĉar ĉiam okazis militoj, ĉiam daŭre okazos militoj, aŭ ke la militoj estas puno sendita de Dio.

A.- Pasintan semajnon ni plian fojon aŭdis tiun lastan argumenton en religia medio kaj konstatis, ke tiuj kristanoj trankvile atendas plej terurajn katastrofojn. Eĉ por ili, pli rapide falos sur la teron la fina plago dia, pli rapide alvenos la Dia Regno.

Cl.- Ŝajnas tamen, ke tia superstiĉa kredo aperas pli kaj pli kiel monstraĵo inda de la plej barbaraj religioj.

A.- Ekzistas aliaj superstiĉoj, kiuj devas same esti denunciataj, ĉar ili malhelpas la progresojn al interpopola paca kunekzistado.

Cl.- Edmond Privat en 1931 denunciis unu el tiuj superstiĉoj en libro titolita *Le choc des patriotismes*

A.- [*La kolizio de la patriotismoj*],

Cl.- Li denunciis la superstiĉon, kiu kredigas al ĉiu popolo, ke la propra patrujo superas ĉiujn ceterajn patrujojn.

A.- La esperantistoj konas lian argumentadon, ĉar tiu verko en 1935 estis esperantigita de li sub la titolo *Interpopola konduto*.

Cl.- La nova vero, kiun provis diskonigi tiu verko en la epoko de Ligoj de Nacioj, povas esti resumita per tiu ĉi paragrafo :

A.- « *La plej grava kulpo de la ŝtataj moralistoj kaj pastraroj estis erara konfuzo inter ununombro kaj multnombro. Ne ekzistas nur unu patrujo, mia patrujo, la patrujo, sed multaj patrujoj, niaj patrujoj, la patrujaro. Tute same en nia lando ne estas nur mi, sed ni.* »

Cl.- De 1935 ni nemulte progresis sur la vojo al la agnosko de la multpatriotismo. Tamen estas pensrevolucio absolute necesa kaj vokata de multaj pensuloj kaj scienculoj. Ĝi signos la eniron en novan eraon.

La milita plago

Claude Gacond, 199-a radioprelego, 1967.08.02 & 1967.08.05

A.- La pasintan semajnon ni konstatis, ke ĉiu plago nutras sian klientaron, kaj por preni ekzemplon, ni ekzamenis, kia klientaro povas profiti pri la plago babelismo. Ni konstatis, ke tiu klientaro vastegas, kaj komprenis, kial esperanto ne povas disvastiĝi pli rapide.

Cl.- Babelismo estas etega plago, kiu apenaŭ suferigas la homaron, kompare al la kolizio de la patriotismoj, la esenca plago de nia jarcento. Tiu plago tiom gigantas, ke kvazaŭ ĉiuj homoj iagrade ĝin servas vole aŭ nevole.

A.- La servemo de la homoj al la dio Marso kondukis al servuto baldaŭ la tutan loĝantaron de nia planedo. Kaj kiel la aglo en la ezopa fablo, ni nur povas vei, ĉar de propra armtekniko ni pereas.

Cl.- Tiu fakto fariĝas hodiaŭ evidentaĵo okulfrapa. Eĉ la plej grandaj estroj de la patrujoj renkontiĝas por malkovri rimedon, kiu permesu malebligi kolizion almenaŭ inter la plej grandaj patrioj, tiom tiu kolizio gravus.

A.- Ĝi neniigus tutajn civilizojn.

Cl.- Apud la renkontiĝoj, kie kunsidas la reprezentantoj de la patriotismoj, okazas miloj da aliaj renkontiĝoj, kiuj grupigas homojn, kiuj serĉas metodojn, kiuj povus liberigi nin de la militminaco. La esperantistoj vidas metodon en la praktiko de la lingvo internacia. La civilistoj en la helpo al la subevoluintoj. La mondanistoj en la konstruo de monda federacio.

A.- Ekster tiuj medioj, kiuj proklamas sian pacifismon, laboras miloj da aliaj homgrupoj. Kiam kunvenadas kuracistoj, sciencistoj aŭ komercistoj por plibonigi la fakan kooperadon mondscale, ili plenumas ege utilan porpacan geston.

Cl.- Ĉiuj tiuj agoj favoras la necesan pensrevolucion, kiun Edmond Privat alvokis. Malgraŭ la naciaj disiĝoj la esperantistoj sin nomas samideanoj. Inter civilistoj, kiuj kunlaboras al la sama konstruo naskiĝas forta amikeco. Inter fakuloj, kiuj perfektigas la saman mondorganizaĵon naskiĝas korporaciemo ĉiujare pli forta kaj iom post iom supernacia.

A.- Gvidantoj apartenantaj al la plej diversaj internaciaj homgrupoj sentas je iu momento la bezonon raporti pri sia laboro kaj averti pri la militdanĝero. Ili kelkfoje proponas rimedon al problemo. Ili alifoje verkas eseon pri la kaŭzoj kondukantaj al la kolizio de la patriotismoj.

Cl.- Tiel trankvile estas forĝata penso supernacia. La studtemoj aŭ labormetodoj povas ŝanĝiĝi, la konkludoj pli kaj pli samas. Novaj sciencoj naskiĝas. Unu el ili studas la kaŭzojn de la konfliktoj. En esperanto oni povas ĝin nomi militologio. Alia provas difini, kio estas paco. En esperanto oni povas nomi ĝin pacologio.

A.- En venontaj elsendoj ni ekzamenos tezojn kaj verkojn pri tiuj novaj sciencoj.

Cl.- Aliaj homoj havas malpli da ambicio. Ili simple raportas pri observitaĵoj. Tiel faris Edmond Privat per sia verko *Le choc des patriotismes – Interpopola konduto*. Tiel ĵus faris Jean Diedisheim eldonante libron titolita *Les patries [La Patrioj]*.

A.- En venontaj elsendoj ni trastudos tiun verkon, kiu citas Edmond Privat. Kaj vi konstatos, ke ĝi helpas al ni fari paŝon antaŭen en la analizo de la intergentaj konfliktoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-